



ESPÉRANTO-NORD

Fédération d'espéranto. Nord-Pas-de-Calais & Picardie

Kunsido de la Federacia Komitato

Dato : 22 MAJ 2005	Horaro : 10 ^a 15 ĝis 13 ^a 00 (2 h 45 min)
Loko : Bersée (59) – Urbodomo, placo <i>M^{al} Alexander</i>	

Tagordo :

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta membrokunveno
2. Elekto de la nova Estraro
3. Principa programo de la Federacio dum la mandatperiodo de la nova Estraro
4. Utiligo de la escepta elspezbuĝeto
5. Venonta ekzamensio
6. Informo koncerne la venontajn kunvenojn pri Boulogne 2005
7. Eŭropa Rendevuo de Morbecque
8. Venontjaraj kongreso kaj membrokunveno

Kunvokitoj :

		Ĉeestis	Senkulpiĝis	Ne ĉeestis
• Xavier Dewidehem, prezidanto	XD	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• France Valet, vicprezidanto	FV	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Jean-Michel Dechaume, sekretario.....	JMD	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Jacques-Henri Poiteau, kasisto (<i>donis rajton al CLE</i>).....	JHP	<input type="checkbox"/>	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Lucien Bourgeois.....	LB	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Michel Dechy.....	MD	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Jean Dietrich	JD	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Marie-Jeanne Liné	MJL	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input checked="" type="checkbox"/>
• Claude Longue-Épée.....	CLE	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Lucie Mazurkiewicz.....	LM	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Arlette Plutniak (<i>donis rajton al RV</i>).....	AP	<input type="checkbox"/>	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Edmond Plutniak (<i>donis rajton al RV</i>).....	EP	<input type="checkbox"/>	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Richard Valet	RV	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Pascal Vilain.....	PV	<input type="checkbox"/>	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Xavier Vilain.....	XV	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input checked="" type="checkbox"/>
•		<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
•		<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
•		<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
•		<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
•		<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
•		<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>

Sume, 12 komitatanoj ĉeestas (9) aŭ estas reprezentataj (3) : la kvorumo estas atingita.

N.B. : La reprezentataj komitatanoj estas signitaj per kursivo en la voĉdonrezultoj.

Aneksaĵo(j) :

1. Principa programo de la Federacio dum la periodo 2005–2007



4. Utiligo de la escepta elspezbuĝeto

Temo k notoj : Sekve al la protokolo de la membrokunveno okazinta en Bulonjo la 26MAR2005 (aparte la decido pri la taŭga utiligo de la disponeblaj enkasigitaĵoj, § 3) kaj al postaj proponoj de komitatanoj, la Komitato precizigas kaj kompletigas la decidon pri tiu utiligo.

Decido :

1. La Komitato asignas ĉiujare dum la venontaj 10 jaroj :
 - po 700 € por instruado kaj ekzamenoj ;
 - po 700 € por propagando.
2. La Komitato asignas ĉi-jare :
 - 2 000 € por la aĉeto de 200 ekzempleroj de *Tinĉjo en Tibeto*, kaj permesas al la Estraro aĉeti pliajn ekzemplerojn laŭbezone ;
 - 300 € por la organizo de la Eŭropa Rendevuo de Morbecque ;
 - 700 € por la subteno al la Brusela Komunikada Centro, sub la premiso, ke la Federacion taŭge informu la Centro pri siaj agadoj, situacio kaj bezonoj.
3. La Federacio dispartigas sian stokon da *Tinĉjo*-albumoj jene :
 - po 30 ekzempleroj por la asocioj-membroj Arras, Dunkerque, Lille-Villeneuve kaj Valenciennes ;
 - 15 ekzempleroj por la asocio-membro Boulogne ;
 - 15 ekzempleroj por la klubo Esperanto 80 ;
 - 15 ekzempleroj por la familio Labit ;
 - 35 ekzempleroj por donaco al oficialuloj k.s.

Poras : Unuanime (12)

Sindetenas : – (0)

Kontraŭas : – (0)

5. Venonta ekzamensesio

Temo k notoj : CLE proponas organizi la junian ekzamensesion en Bersée kaj klarigas la praktikajn kondiĉoj. Debato okazas pri la financado de la sesio far la Federacio (CLE pledas por pago de la tuto kaj por ĉiuj far la Federacio).

Decido :

<i>Kio</i>	<i>Kiu(j)</i>	<i>Kiam</i>
1. La federacia ekzamensesio okazos dimanĉon 26JUL2005 , matene (ekde la 9 ^a 00) kaj posttagmeze, en la urbodomo kaj la mediateko de Bersée (placo <i>M^{al} Alexander</i>).		
2. La sesio enhavos la unuajn tri ekzamengradojn, escepte la fakajn branĉojn de la ekzameno pri kapableco.		
3. La surlokan organizon prizorgos CLE. La enskribiĝojn kolektos XD. XD informos CLE'n pri la nombro da kandidatoj por ĉiu grado.	CLE, XD	Dum junio
4. Ĉiuj klubestroj listigu siajn ekzamenotojn kaj sendu la listojn al XD.	Ĉiuj kluboj	20JUN2005
5. La Federacio pagos la tutan ekzamenkotizon de la federacianoj ekskluzive. Eblos membriĝi al la Federacio surloke. La kluboj povos pagi mem la ekzamenkotizon de siaj lernantoj-nefederacianoj. La Federacio ne pagos la tagmanĝojn.		
6. XD diskutos kun FEL, por ke la Federacio ricevu informojn pri la ekzamenrezultoj.	XD	Meze de junio

Poras : XD, FV, JMD, LB, MD, JD, LM, AP, EP, RV (10)

Sindetenas : CLE, JHP (2)

Kontraŭas : – (0)

6. Informo koncerne la venontajn kunvenojn pri *Boulogne 2005*

Temo k notoj : *Boulogne 2005* naskis profiton je ĉ. 24 000 €. La Federacio enspezis ĉ. 400 € (vendo de poŝtkartoj) kaj ĉ. 2 000 € (subvencioj de la departemento kaj de la regiono). Okazos kunveno de la komisiitoj de la Organiza Komitato en Dunkirko la 11JUN2005 : la celo estos prepari la lastan plenkunsidon de la Organiza Komitato, kiu okazos en Bulonjo la 29JUN2005, kaj dum kiu oni pritraktos i.a. la dispartigon de la profitmonon el *Boulogne 2005*.

7. Eŭropa Rendevuo de Morbecque

Temo k notoj : 1. La ĉi-jara Eŭropa Rendevuo de Morbecque okazos dum la semajnfino 5-6NOV2005.
2. Notinda (kaj sciiginda) estas la speciala, malpli alta tarifo por la junuloj.
3. La Komitato invitas ĉiujn klubojn instigi siajn lernantojn kaj siajn junulojn partopreni la Rendevuon.

8. Venontjaraj kongreso kaj membrokunveno

Temo k notoj : 1. La Komitato konstatas, ke neniu klubo jam kandidatas al la organizo de la federacia kongreso de 2006.
2. Prezidanto XD alvokas la klubojn, por ke ili informiĝu pri la kulturaj aŭ rimarkindaj eventoj, kiuj okazos en siaj respektivaj urboj kaj ties ĉirkaŭaĵoj dum la venontaj jaroj (urbĝemeliĝo, speciala datreveno, lingva aŭ kultura festivalo, starigo de ZEO...). La de-nuna ideo estas laŭeble parigi la federacian kongreson kun loka interesa evento, kiu povas iel ligiĝi al Esperanto, lingvoj, kulturoj aŭ transnaciaj rilatoj. Tia parigo ebligus pli grandan eĥon de niaj kongresoj.
3. Tiukadre, prezidanto XD instigas la klubojn al kandidatigoj por la jaro 2006 sed jam ankaŭ por la sekvantaj jaroj (2007, 2008...).

Informoj aŭ pritraktotaj aferoj :

1. CLE estas nomumita reprezentanto de la Federacio ĉe la komitato de UFE dum ties juniaj kunsidoj.
2. Pro translokiĝo en julio, PV sciigis sian demision de sia komitataneco. Lia demisio efektiviĝos ĉi-somere. La asocio-membro Dunkerque-Espéranto povos tuj alekti unu dunkirkan anstataŭulon, kies mandato daŭros ĝis printempo 2007.
3. La venonta kunsido de la Federacia Komitato okazos en septembro aŭ oktobro 2005.

Protokolo farita la 28^{an} de junio 2005.



XAVIER DEWIDHEM
Prezidanto



JEAN-MICHEL DECHAUME
Sekretario


PRINCIPA PROGRAMO DE LA FEDERACIO DUM LA PERIODO 2005–2007

Okaze de sia kunsido la 22^{an} de majo 2005 en Bersée (59),
Sekve al la elekto de sia nova Estraro,

La Federacia Komitato alprenas la jenan principan programon por la periodo 2005–2007. Ĝi konsistas el la jenaj kvin kampoj :

1. Federacia Komitato :

- a. Partoprenigo de plej multaj Komitatoj en la ĉiutaga administrado de la Federacio : kreo aŭ oficialigo de taskoj/responsoj (*kiuj fontos el la ĉi-subaj punktoj*) donotaj al po 1–3 Komitatoj.
- b. Forma refando de la kunsidaj protokoloj cele al pli rapida ekscio pri la enhavo kaj la alprenitaj kaj aplikotaj decidoj.
- c. Preparo de la venonta renovigo de la Komitato, kiu okazos en la federacia kongreso de 2007, laŭ la novaj statutaj reguloj.

2. Komunikado :

- a. Daŭra apogo al la federacia revuo *Norda Gazeto*.
- b. Plivalorigo de Interreto kiel montrofenestro kaj informejo de la Federacio (*nova retejo*) kaj kiel komunikilo inter la federacianoj-retanoj (*retforumo*).
- c. Diskonigo pri la agadoj kaj aranĝoj de la Federacio kaj de la asocioj-membroj (*Morbecque, ekzamenoj, prelegoj, renkontiĝoj...*) al la esperantistoj tutlandaj kaj translimaj (*per la informiloj Okazas, Le Monde de l'Espéranto, La Sago, TEJO-Aktuale, Ret-Info...*).

3. Kunordigado :

- a. Alligado de ambaŭ regionoj Nord-Pas-de-Calais kaj Picardie, inkl. en la Komitato.
- b. Regulaj vizitoj de la prezidanto aŭ de estrarano en la lokaj kluboj por informi, konsulti kaj diskuti kun la lokaj membroj (*laŭsperte de la konsultaj «turneoj» de Xavier Dewidehem en la lokaj kluboj pri la novaj statuto kaj interna regularo*).
- c. Plifirmigo de la reto de departementaj reprezentantoj.
- d. Daŭra, firma kunlaboro kun UFE ekz. kadre de tutlandaj kampanjoj al oficialuloj kaj politikistoj.
- e. Starigo de rilatoj kun la ceteraj Esperanto-federacioj de Francio cele al interŝanĝoj kaj agada harmoniigo.

4. Instruado kaj ekzamenoj :

- a. Daŭra okazigo de regula, ĉiujara federacia ekzamensesio laŭ la unuaj tri gradoj de FEL, fine de la lernjaro. Elekto de konstanta federacia ekzamencentro. Monhelpe al la ekzamenatoj rilate la ekzamenkotizon.
- b. Monhelpe al la Esperanto-kursoj rilate la aĉeton de lernlibroj k.a.

5. Kulturo kaj aranĝoj :

- a. Daŭra apogo al la ĉiujara Eŭropa Rendevuo de Morbecque. Instigo al la Esperanto-lernantoj kaj al la junuloj partopreni la Rendevuon.
- b. Organizo de la ĉiujaraj federaciaj kongresoj kombinante la formojn tradician kaj Esquelbecq'an (diskuttrondoj).
- c. Konstanta rilato kun la UFE-responsulo pri prelegvojaĝoj por organizi prelegvojaĝojn tra Norda Francio.
- d. Invito al la asocioj-membroj ĝemeliĝi kun Esperanto-kluboj de la respektivaj ĝemelurboj.
- e. Reliefigo de la ĝemelrilataj kaj turismaj utiloj de Esperanto al la lokaj publikaj instancoj.